

Esperanto aktuell 2017/4



● Fundstücke! 130 Jahre Esperanto, und ich habe 125 Jahre davon nicht mitbekommen! ● La unua Zamenhof-monumento en Aŭstrio ● Protokoll der Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes ● Esperanto denove en Woodstock!

Deutscher Esperanto-Bund e.V.

Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B

www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

gea.eo.tel (Kontaktdaten)

Bankkonto (por membrokotoj kaj donacoj) /

Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEFIERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den

D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle:

Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: **Sibylle Bauer**

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

Membropriorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 – 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 – 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere

Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie

wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die

angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern**

sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu

wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesaĝo al gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar

per E-Post-Adresse in der Form

vorname.name@esperanto.de.

Siehe auch estraro.gea.eo.tel

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Landaj ligoj / Landesverbände

Wolfgang Bohr, Durchwahl: -5114

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg

Publika agado kaj pliklerigado /

Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung

Oliver Walz, Durchwahl: -5116

Retpaĝo, dissendolistoj / Internetauftritt,

Mailinglisten

Julia Noe, Durchwahl: -5117

Jugendvertreterin / GEJ-komisiito

Cornelia Luszczek, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5121

gej.prezidanto@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Siehe auch gea.eo.tel

Gazetara parolisto / Pressesprecher

D-ro/Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19,

70186 Stuttgart, 0163-3873785,

rainer.kurz@esperanto.de

Verantwortlicher für Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenber, Durchwahl: -5121

medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand

Printempa Semajno Internacia (PSI) /

Internationale Frühlingswoche

Petra Dückerhoff, Durchwahl: -62

psi@esperanto.de, www.esperanto.de/psi

Rondvojaĝoj / Rundreisen

Lars Sözüer, Durchwahl: -5123

rundreisen@esperanto.de

www.esperanto.de/rundreisen

Kontaktadresoj / Kontaktadressen

Julia Noe, Bergiselstraße 3, 79111 Freiburg

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

gej.eo.tel (Kontaktdaten)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,

www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

bibliothek@esperanto-aalen.de; www.esperantobibliothek.de

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aej@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

aej@esperanto.at, <http://aej.esperanto.at>

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauf-

tragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen siehe

mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Postel. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuell

ISSN 0942-024 X, 33. Jahrgang

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -541

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Uwe Stecher (Österreich, El la mondo),

Hermann Kroppenber (Medienecho),

Utho Maier (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck

Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuell kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

Esperanto aktuell mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc

a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2017/5 ĝis la

15-a de septembro 2017. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format

*.doc o.ä.) an ea@esperanto.de, für Nr. 2017/5 bis

zum 15. September 2017. Papierbeiträge nur im

Ausnahmefall, dann an Yashovardhan (s.o.).

Esperanto aktuell aperas ankaŭ por blinduloj, danke al Uwe Stecher el Aŭstrio: en DOC-formato, kun priskribo de la fotoj.

Interesiĝantoj skribu al punktor@live.at

Karaj legantoj,

hieraaŭ mi revenis de la 102-a Universala Kongreso. La korea ĉefurbo Seulo dum unu semajno ankaŭ estis „ĉefurbo de Esperanto“, kiel diris la UEA-prezidanto Mark Fettes en sia enkonduka prelego. Partoprenis preskaŭ 1200 esperantistoj el ĉirkaŭ 70 landoj. Kiel kutime dum Universala Kongreso okazis amaso da paralelaj programoj. La ĉefa temo „Turismo kaj evoluo – Vojo al daŭripovo“ konformis al prioritato deklarita fare de UN por la nuna jaro. Per aro da prelegoj kaj „scienca kafejo“ al la programo kontribuis la tradicia Kongresa Universitato. Fakaj kunsidoj direktiĝis al plej diversaj celgrupoj: de nefumantoj ĝis „Esperanta Sumoo“. Por komencantoj okazis paroligaj kursoj. Koreaj esperantistoj informis en serio de prelegoj pri sia lando kaj klopodis konatigi nin kun la bazoj de la korea lingvo. La ekskursita programo estis dediĉita al la plej vidindaj aŭ politike plej interesaj partoj de la lando (mi mem partoprenis en ekskurso al la inter-korea landlimo). Okazis „pontkunveno“ de esperantistoj kaj koreiaj parlamentanoj pri la perspektivoj por reunuiĝo de la lando en la domo de la nacia parlamento. Jen nur kelkaj impresoj pri la riĉega programo de la kongreso. Kvankam streĉa – precipe sub la kondiĉoj de la ŝvitiga somera klimato en Seulo – tiu semajno denove pruvis la utilecon de nia komuna lingvo kaj la viglecon de la movado. Certe multaj ŝatintus daŭrigi kaj simple ĝui la etoson. Sed venis la tempo por konkludi.

Mia unua konkludo: finiĝis la „eŭrocentrismo“, kiun oni foje riproĉis al la Esperanto-movado. La plej granda grupo de aliĝintoj (pli ol 240) venis el Koreio mem, kie funkcias tre aktiva loka movado. Partoprenis ankaŭ – laŭ listo en la kongresa libro – 187 japanoj kaj 114 ĉinoj: do kongreso kun tre forta kaj ĉie videbla azia elemento. Kaj impresis ne nur la nombroj, sed ankaŭ la sukcesoj, kiujn niaj gekolegoj povis demonstri. Mi jam menciis la „pontkunvenon“ pri koreia reunuiĝo: ĝi verŝajne ne signifas proksimigi la deklaran celon, sed ja vekis grandan publikan atenton. Sukceso de ĉinaj esperantistoj estas la „UNESKO-Kuriero“, kiu nun regule aperas ankaŭ en Esperanto, danke al financa subteno de la ĉinia registaro.



Dua konkludo: la Esperanto-komunumo moderniĝas, sed la movado ankoraŭ ne estas sufiĉe bone organizita por plene profiti de la novaj medioj, kiuj komencis ŝanĝi la kutimojn de Esperanto-lernado. Multegaj intertempe lernas la lingvon per interretaj kursoj, multaj eĉ ekzameniĝas. „Amikumu“ prezentas eblecon per interreto rapide trovi Esperanto-parolantojn proksime kaj malproksime. „Ekparolu“ estas programo por aktivigi la partoprenintojn de interretaj kursoj: ĝia bazo estas organizita skajpa kontakto inter „genevoj“ kaj „geonkloj“ – libervoluloj el la tuta mondo, kiuj instigas paroli kaj korektas erarojn. Ni povas ĝoji pri tiu kreskanta intereso, sed devas daŭre atenti kiel vivteni la Esperanto-movadon, sen kiu ankaŭ la lingvo mem riskus perdiĝi. Alia efiko de moderniĝo estas la principe decidita enkonduko de „reta“ membreco en UEA je reduktita tarifo.

Kaj tria konkludo: la kultura riĉeco de la Esperanto-movado apenaŭ ie tiom videblas kiel dum la Universala Kongreso. Ĉu teatraĵoj, ĉu muziko aŭ partopreno en la belartaj konkursoj: la Esperanto-medio profitas de sia tutmondeco kaj ankaŭ kulture fariĝis verŝajne pli vigla ol tiu de naciaj lingvoj kun komparebla nombro de parolantoj.

Jen miaj iom optimismaj konkludoj post reveno de la UK. Mi ĝojas diskuti ilin kun vi en la venontaj monatoj – por partoprenigi vin en tiu optimismo, sed ankaŭ ĉar la menciitaj defioj koncernas nin ĉiujn.

Ulrich Brandenburg
(Prezidanto de GEA)

Enhavtabelo/Inhalt

1: Sibille Bauer prizorgas la Berlinan GEA-oficejon (legu sur la p. 12)

2: Adresoj

3: Germana Esperanto-Asocio:
Karaj legantoj! Enhavtabelo

4-5: Interkultura Centro Herzberg:
Arbara lernejo. Kleine Feier „11 Jahre Herzberg - die Esperanto-Stadt“. 12-a TORPEDO en Herzberg am Harz. 170 gimnazianoj informitaj pri Esperanto

6-9: Aŭstria Esperanto-Federacio:
En Svitavy kontraŭ Babelo. La unua Zamenhof-monumento en Aŭstrio. Filozofias Koloroj en Vieno. Forpasis Umberto Eco kaj Telemax (Dr. Robert Löffler). Mein kleiner Wiener Sprach-Komplex Bericht über eine Heilung. Korespondpeto

10-11: El fakaj ligoj: Informstando ĉe la Evangeliaj Ekleziotagoj en Berlin. Preĝi en Esperanto. Tradukantoj serĉataj por grava revuo. Verbandsrat des Deutschen Esperanto-Bundes am 28./29. Oktober 2017 in Herzberg (Harz): Seminar zur Öffentlichkeitsarbeit

12-15: Germana Esperanto-Asocio:
Fundstücke! 130 Jahre Esperanto, und ich habe 125 Jahre davon nicht mitbekommen! Protokoll der Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes e.V am Sonntag, 04.06.2017 in Freiburg.

16-18: Medienecho

19-21: El la mondo

22: Kalendaro

23-24: Intervjuo: Warum wurde Esperanto verfolgt?

25-27: El bibliotekoj kaj arkivoj
Folge 33: Bialystoker Skandalchen um Zamenhof-Comic; das neue Urheberrecht

28-29: ~~kune~~ – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Sinprezento: Michaela Stegmaier. PEKO 2017. Neuer Jugendstammtisch in Herzberg. Pri KEKSO en Würzburg

30: Renkontiĝoj: Poliglota renkontiĝo. Esperanto denove en Woodstock!

31: Recenzo: Ed Borsboom: *Kie miozotas memor*

32: Fotoj el Multkultura Vilaĝo Esperanto dum la 23-a Woodstock-festivalo en Pollando



Unu el la plej sukcesaj programeroj estis la preskaŭ tuttaga teatro-metiejo kun komune ellaborita „nigra teatraĵo“ per helpo de ultraviolaj radioj. La urba junulgvigantino Sarah Hoffmann kune kun Michaela ellaboris interesan vesperan prezentadon en la „Domo de la Gastoj“ en Herzberg-Siebert. Ĉiuj junulinoj el ambaŭ urboj kunaktoris. Estis gaja vespero. La magia vorto „ESPERANTO“ estis la kerntemo.

Venis gastoj, geamikoj, lokuloj kaj eĉ la urbestro Lutz Peters aperis kaj ĝojis pri la eksterordinara kulturprogramo.

Certe vi ankoraŭ legos kaj aŭdos pri la unika bilaterala junularsemajno, eble la plej sukcesa en la 12-jara SALO-historio. En julio 2018 sekvos la 13-a SALO-evento.

Arbara lernejo

En sinsekvo jam de 12 jaroj ni organizas la t.n. Someran Arbaran Lernejon, ĝemelurban semajnon por gejunuloj el Herzberg am Harz & Górá/PL.

En julio 2017 SALO-12 okazis en Herzberg-Siebert. Flanke de Górá gvidis ĝin la instruistino Lidka Nowak kaj Iwona kaj flanke de Herzberg - la Esperanto-urbo Zsófia Kóródy kaj Michaela Stegmaier (prezidantino de GEJ).

Pli kaj pli la gejunuloj el ambaŭ urboj amikiĝas. Tio estas bela potencialo por la estonteco.

Estis pleneta semajno, ekzemple ĉiuj fariĝis „Esperanto-skoltoj“ post plenumoj de diversaj taskoj kaj promesoj. Ĉiu ricevis verdan skoltan koltukon (tio estas aparta rakonthistorio) kun etaj sed esprimriĉaj simboloj rilate al la akiritaj poentoj.

Okazis ekskursoj al Braunschweig kun esperantlingva urbogvidado fare de d-ro Wilfried Hinrichs kaj al bela naĝejo en Bad Lauterberg.

Kleine Feier „11 Jahre Herzberg - die Esperanto-Stadt“

Es ist schon ein guter Brauch, alljährlich an den Beschluss des Stadtrates Herzberg am Harz vom Juli 2006, nämlich der Stadt den Beinamen „-die Esperanto-Stadt“ zu geben, zu denken.

Verschiedene Kulturaktionen und ein Grillfest im „Esperanto-Garten“ des Interkulturellen Zentrums Herzberg wurden durchgeführt. Trotz starken Regenwetters waren viele Teilnehmer erschienen, u.a. auch aus Bulgarien, den Niederlanden, Polen und der Schweiz. Gemeinsam wurden viele bekannte Volkslieder gesungen und es wurde viel musiziert und gelacht.

Wegen besonderer langjähriger Leistungen für Esperanto und Herzberg wurden Andreas Emmerich als langjähriger Stellvertretender Vorsitzender des Deutschen Esperanto-Bundes, Zsófia Koródy vom Vorstand des Esperanto-



Zentrums, Michaela Stegmaier (neue Vorsitzende der Deutschen Esperanto-Jugend) und Ursula Zilvar als Vorstandsmitglied durch den Vereinsvorsitzenden mit der Herzberger Stadtwappenmedaille „Esperanto-urbo“ ausgezeichnet. Diese wertvolle Medaille aus Bronze wurde von dem Dresdner Medailleur Peter Götz Güttler kreiert. Die Geehrten freuten sich über diese Überraschung.

Peter Zilvar hob hervor, dass Herzberg am Harz wegen der Aktivitäten rund um Esperanto immer bekannter wird, sogar in Massenmedien im fernen Mexiko und in den Golfstaaten wurde unlängst ausgiebig über Herzberg - die Esperanto-Stadt und das Zamenhofjahr 2017 berichtet. Das schöne Herzberger Zamenhof-Denkmal wird immer mehr von den Medien genutzt.

Die zwölfte Begegnung mit Jugendlichen aus den Partnerstädten Góra/Polen und Herzberg am Harz und Sommer-Esperantokurse sowie offizielle Sprachprüfungen nach dem Anspruchsprofil B1 und C1 nach dem Europäischen Referenzrahmen (GER) sind ebenfalls in den letzten Wochen erfolgreich organisiert worden. Man will in den nächsten Jahren verschiedene Kulturangebote ausbauen.

12-a TORPEDO en Herzberg am Harz 29.09. - 03.10. 2017

La ĉi-jara ĉeftemo: „Plibonigo de lingvaj konoj kaj movada spertiĝo.“ Ĉefprelego fare de profesorino Sabine Fiedler el Leipzig pri la grava temo: „Frazologio en Esperanto – kun komparoj de parolturnoj en diversaj lingvoj“.

Plie prelegos Zsófia Kóródy pri komparoj de ĉeestaj kaj interretaj kursoj, pri lingvaj ludoj kaj instruhelpiloj kaj pri nuntempaj Esperanto-movadaj temoj.

Petro Zilvar gvidos metiejon pri tradukado de tekstoj el diversaj sciencaj kaj fakaj branĉoj, pri pluklerigado de kompetentaj faktradukistoj kaj pri malfacilaĵoj traduki kanttekstojn al Esperanto.

Al la evento alvenos ankaŭ gekolegoj, geamikoj el nia pola ĝemelurbo Góra.

Krome: Samtempe okazos KEKSO, la klerigevento de Germana Esperanto-Junularo sub gvido de Michaela Stegmaier.

Kompreneble okazos ekskursoj en la bela turisma regiono de la Harz-montaro kaj ni vizitos interesajn muzeojn.



Kelkajn tagojn antaŭ la 29-a de septembro 2017 komenciĝos la trilanda projekto Erasmus+ en Herzberg-Sieber. Venos delegacioj el Pollando, Slovakio kaj Germanio kaj ili partoprenos ankaŭ la TORPEDO-eventojn.

Gvidos la eŭropan seminarion i.a. Halina Komar (PL), Katalin Kováts (NL), Petro Baláz (SK) kaj Zsófia Kóródy (DE).

Bonvolu baldaŭ aliĝi per esperanto-zentrum@web.de. Pli da detaloj sur nia hejmpaĝo: esperanto-urbo.de/ Programoj 2017 aŭ rekta alirvojo: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=37116745>.

170 gimnazianoj informitaj pri Esperanto

Komence de aŭgusto 2017 komenciĝis la nova lernoĵaro en Malsupra Saksio.

En la EMA-Gimnazio en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo okazis aparta informhorso por ĉiuj lernantoj de la 5-a kaj 6-a klasoj pri posttagmezaj okupoj, libere elekteblaj fakoj.

Al la evento – dank' al la bona kunlaboro de Interkultura Centro Herzberg kaj la Gimnazio – ni ricevis inviton por prezenti Esperanton, ja ni denove planas oferti Esperanto-fakrondon.

En la informhorso partoprenis ĉ. 170 gelernantoj (kaj iliaj instruistoj), inter ili lernantino, kiu fine de junio 2017 jam ĉeestis feriotempan Esperanto-kurseton en la Esperanto-Centro.

Zsófia Kóródy
AGEI-prezidanto

En Svitavy kontraŭ Babelo

La 9-an kaj la 10-an de majo 2017 okazis en Svitavy, Ĉeĥio, du sinsekvaj aranĝoj en la Esperanto-Muzeo. Ili ambaŭ havis kiel la ĉefan parton inaŭguron de la nova ekspozicio nomata „La Homo Kontraŭ Babelo”.

La kialo estis, ke vendrede la 9-an de majo ĝi estis enkadre de la Muzea Nokto por neesperantista publiko en la ĉeĥa, sed sabate la 10-an temis pri internacia aranĝo por esperantistoj nature en Esperanto.

La ekspozicio estas dediĉita ĉefe al ĉi-jaraj jubileuloj de la Esperanto-movado, nome al la iniciatinto de Esperanto L. L. Zamenhof kaj du elstaraj ĉeĥaj pioniroj, Francisko Valdomiro Lorenz (1872-1957), poligloto scipovinta 104 lingvojn, kiu en la jaro 1890, kvankam malriĉa studento, proprakoste eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj kaj kiel 20-jarulo elmigris al Brazilo, kie li vivis kaj verkis ĝismorte. La dua estas pedagogo Theodor Čejka (1878-1957), la aŭtoro de lernolibroj kaj unuaj vortaroj, sed ankaŭ eldoninto de la unuaj Esperanto-gazetoj en Ĉeĥio.

Aktualigita estas ankaŭ la „daŭra“ parto de la ekspozicio. Jen ekzemple unu de novaj unikaĵoj: Identecmalkovro de kelkaj eksterlandaj korespondamikoj de Eduard Skála el la jaroj 1908 ĝis 1913, inter ili la tiam 15-jara princo Adalberto, estonta reĝo Georgo la Sesa kaj patro de la brita reĝino Elizabeto la Dua.

Ĉi-jare en Svitavy koincidis la Muzea Nokto kun la Preĝeja Nokto, tial estis malfermitaj kaj senpage alireblaj ne nur la Esperanto-muzeo kaj la Urba muzeo kaj galerio (parenteze: ene de ĝi estas daŭra ekspozicio pri la plej konata naskito de Svitavy kaj savinto de multaj judoj Oskar Schindler), sed ankaŭ kvin preĝejoj – ĉie kun riĉa programo, preparita por la vizitantoj.

La inaŭguro de la ekspozicio do okazis dufoje: vendrede en la ĉeĥa, sabate en Esperanto, kun similaj programoj. Krom propra inaŭguro de la ekspozicio kun enkondukaj vortoj de la ĉefaranĝanto de la ekspozicio Pavla Dvořáková, okazis du prelegoj. Petro Chrdle parolis pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenz, kio estis sekvata de lanĉo de du lingvaj versioj de la verko fare de prof. Vlastimil Novobilský, eldonita de la eldonejo KAVA-PECH, „F. V. Lorenz. Atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo“, kiun el la ĉeĥa originalo esperantigis Margit Turková. Jano Vajs (SK) prezentis



Prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio Libuše Hýblová, Petro Chrdle kaj Martin Stuppňig. Foto: Vlado Škuta.

siajn travivaĵojn en Nepalo dum la Himalaja renkontiĝo. La sabatan programon, jam en Esperanto, riĉigis Bernhard Tuidar, kiu prezentis la Esperanto-Muzeon en Vieno, kaj Laŝa Ĉaĥunaŝvili el Kartvelio, momente staĝanta en Slovakio ĉe E@I, prezentinta la retejon *zamenhof.info*, kiu prezentas nian majstron jam en multaj lingvoj. Riĉaj estis ankaŭ la vesperaj programoj. Vendrede, kadre de la kultura vespero, preparita de la svitavanoj, al la loka publiko prezentiĝis ankaŭ L. L. Zamenhof en plenumo de Jan Řepa. Sabate okazis koncerto de la muzikgrupo Noproblem, kiu kantas ankaŭ en Esperanto. Dum la koncerto estis lanĉita ĝia dua kompakta disko en Esperanto.

Inter la ĉeĥa publiko, vendrede, ĉeestis ankaŭ la urbestro kaj bibliotekistino de la urbo Vrdu, al kiu nun apartenas la naskiĝvilaĝo de F. V. Lorenz Zbyslav. Ili post la prelego pri Lorenz tuj surloke mendis ĝin ankaŭ por lia naskiĝloko kaj eĉ trovis por ĝi konkretan aŭtunan daton. La sabatan Esperanto-parton ĉeestis krom ĉeĥaj esperantistoj ankaŭ eksterlandaj gastoj el Aŭstrio, Ĉinio, Francio, Japanio, Kartvelio, Pollando kaj Slovakio. Ambaŭ tagojn ĉeestis ankaŭ Martin Stuppňig (AT), kiu prezentis sian verkon „Home en senhomeco. Militimpresoj“.

La nuna ekspozicio daŭros ĝis septembro 2018, kiam ĝin anstataŭigos ekspozicio omaĝe al la dekjariĝo de la muzeo. Pli da informoj kaj fotoj troveblas ĉe www.muzeum.esperanto.cz. Eksterlandaj gastoj estas ĉiam bonvenaj. Ja ne nur la menciitaj du muzeoj, sed ankaŭ la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo havas multon interesan por oferti. Planante vian viziton bonvolu anonciĝi anticipe ĉe muzeo@esperanto.cz. La plej proksima okazo por ĝui en Svitavy Esperanto-etoson estos ekde la 22a ĝis la 29a de septembro, kiam tie okazos Internacia Esperanto-Renkontiĝo.

Petro Chrdle

La unua Zamenhof-monumento en Aŭstrio

La unua Zamenhof-monumento en Aŭstrio troviĝas en Wörgl [Wergl], Tirol, antaŭ la stacidomo.

La solena inaŭguro okazis la 27-an de julio 1952 precize je la 10.30 h, disaŭdigata de Radio-Innsbruck, per saluta alparolo de la komitata honorprezidanto, s-ano kortega konsilisto Hugo Steiner.

Li skizis la estiĝon de la monumeto kaj esprimis al ĉiuj akcelintoj de la prokjekto dankon de la komitato. La iniciatinto de la monumeto Hans Steiner esprimis sian ĝojon pri la sukcesa efektiviĝo de sia plano kaj dankis al ĉiuj helpintoj kaj subtentintoj. La senvualigon de la blankmarmora busto de nia majstro faris s-ro viclandestro Mayr. Ĝi estis kovrita per la Esperanto-flago. Post subskribo kaj enmurigo de la inaŭgura dokumento la urbestro de Wörgl kom. kons. Martin Pichler transprenis la monumenton sub la protekton de la urbo, dankante al la komitato pro distingo de la urbo per la unua monumento tia en nia ŝtato. S-ano Theodor Ohnesorge, la artista skulptisto, esprimis sian ĝojon, ke li povis dediĉi sian kapablon al la honorado de unu el la plej eminentaj amikoj de la homaro. Fragmento el *Aŭstria Esperanto-Revuo* julio/aŭgusto 1952. Pli da informoj ĉe Informletero: http://ftpmirror.your.org/pub/wikimedia/images/wikipedia/eo/a/ab/Informletero_07_19520001.pdf.

Germanlingva artikolo pri la evento troveblas ĉe Vivomondo: http://www.vivomondo.com/de/vivowiki/inhaltsverzeichnis/einrichtungen/zamenhof_denkmal

En la jaro 2008, post la novformado de la monumento, okazis festkunveno. Germanlingva artikolo pri la festkunveno troviĝas ĉe Vero-online-info: <http://vero-online.info/page.php?id=880>. **Leopold Patek**



Esperantistoj ĉe la Zamenhof-monumento en Wörgl
Fotoj: Veronika Spielbichler

Filozofias Koloroj en Vieno

La 24-an de majo 2017 okazis en la galerio Steiner (Kurrentgasse 4, 1010 Vieno) inaŭguro de la ekspozicio „Filozofias Koloroj” de la japana pentristino Misa Aihara (<http://www.5d.biglobe.ne.jp/~uam53283/>).

Antaŭe la verkistino informis esperantistojn en Vieno pri tiu aranĝo kaj invitis ilin veni. La artistino pentras grandformatajn abstraktajn pentraĵojn, dominata je lumantaj koloroj.

Ŝi titolas ĉiun pentraĵon en Esperanto kaj la japana. Ĉar sinjorino Aihara ne sufiĉe scipovas la anglan por





fari paroladan en ĉi tiu lingvo, ŝi preferis fari sian inaŭgurparoladon en Esperanto, tradukata samtempe per samideano Uwe Stecher.

Bedaŭrinde, la galeriistino, sinjorino Steiner, kredis ke la pentristino parolis japane kaj dankis al la tradukisto Stecher pro liaj bonaj konoj de la japana. Sed ĉeestantaj esperantistoj povis korekti tiun malgrandan eraron.

Kurt Lhotzky

Forpasis Umberto Eco kaj Telemax (Dr. Robert Löffler)

La fama kultursciencisto kaj aŭtoro prof. Umberto Eco mortis lastjare la 19-an de februaro, 84-jara. Samjare la 27-an de decembro ankaŭ la kulturkolumnisto de la aŭstra taggazeto kun la plej granda eldonkvanto (preskaŭ miliono da ekz.) „Kronenzeitung“, d-ro Robert Löffler, kiu prizorgis sian kolumnon TELEMAT eĉ ĝis sia forpaso en la aĝo de 85 jaroj.



Kio ligas ambaŭ personecojn? Krom ilia erudicio du anekdotoj: En la eldono de la 22-a de junio 2000 Telemax (TMX) raportas pri televida elsendo okaze de la Longa Nokto de Muzeoj, en kiu oni ankaŭ montris scenon el la Esperantomuzeo en Vieno. Li mencias simpatian sinjorinon, kiu asertis pri sia figuro „sufiĉa in“. Li interpretis tion per „Genügend drin!“. Nun en la originala lingvo la daŭrigo: „Ihr Tmx ist ein großer Freund des Esperanto-Gedankens, er spricht aber diese Sprache nicht. Doch was ich in die Aussage der Dame hineininterpretiere, bringt mich auf die Frage: Eignet sich Esperanto auch zur Pikanterie? Ist Liebesgeflüster auf Esperanto möglich? Liebe Leute, der Ruf von Esperanto unter den Laien ist: Man kann damit nach einer Gasse fragen ..., man kann damit etwas zu trinken ordern. Doch wie steht es mit der Poesie, mit dem Intimen? Was heißt Schamhaar auf Esperanto? Ich weiß es nicht. Außer der Vermutung mit der Dame habe ich freilich noch ein Indiz, dass Esperanto über die Bierbestellung weit hinausgehen muss. Ich kenne ein Wort, „ekruĝi“. Gesprochen ekrudschidschi, und das heißt „plötzlich rot werden“. Nun wird sich der Leser schon seinen Teil denken ...“

La konjekto de Tmx kondukas al sceno en la Universitato Parizo VII, kie Umberto Eco parolis pri lingvoj, ankaŭ pri planlingvoj. En tiu tempo li ankoraŭ havis la saman opinion pri Esperanto kiel la laikoj menciitaj antaŭe de Tmx. Tion li esprimis per retorika demando: Ĉu iu el vi jam amoris per Esperanto? Anstataŭ la atendita aplaŭda ridado de la studenta publiko iu studentino ekstaris kaj tre ĉarme protestis: „Mais oui, professeur, moi même!“ (Sed jes, profesoro, mi mem!). Oni diras, ke tio renversis la opinion de Umberto Eco pri la viveco kaj kapableco de Esperanto, kiun li poste dokumentis en siaj publikaĵoj. Ambaŭ anekdotoj demonstras, ke jes eblas liberiĝi de antaŭjuĝoj.

Hans Michael Maitzen

Mein kleiner Wiener Sprach-Komplex

Bericht über eine Heilung

Mit Menschen zu reden nimmt den größten Teil meiner Arbeit ein. Das geschieht in meiner Muttersprache, dem Wienerischen, bestenfalls in einer schlampigen Variante der österreichischen Umgangssprache.


Das gelang bis jetzt sehr gut - auch mit jenen Einwanderern vom Balkan oder aus Asien, die ja meistens großes Interesse haben, hier Fuß zu fassen. Doch in den letzten Jahren werde ich immer öfter mit dem gesprochenen Standarddeutsch von Gesprächspartnern konfrontiert, die von Deutschland nach Österreich einwanderten. Ihre Ausdrucksweise klingt für uns ungewohnt hart, sehr direkt und wirkt dadurch oft unfreundlich. Und zum Schluss kommt immer das unvermeidliche „tschüss“ geschossen (Herrschaftszeiten, denk ich mir, wir sind nicht per du, hier verabschiedet man sich mit „Auf Wiederseh'n“, „Wiederschau'n“, „Pfiat Gott“, ...). Aber wäre es nur das: Da in Deutschland Dialekte immer mehr vom Aussterben betroffen sind, haben meine bundesdeutschen Gesprächspartner eine größere Sprachgewandtheit, einen größeren Wortschatz im Standarddeutschen - immer öfter bleibt mir das Gefühl, mich ungeschickt und primitiv ausgedrückt zu haben: Mein kleiner Wiener Sprachkomplex.

Doch dann kam die Rettung in Form eines Infobriefs des VDS: In der Neuen Zürcher Zeitung geht es um den „kleinen Komplex“ der Schweizerdeutschen besonders bei der Aussprache des Hochdeutschen. „Man höre nur, wie manche gestandene Parteivertreter im Bundesparlament radebrechen oder wie wir in Debatten mit nördlichen Nachbarn verstummen angesichts von deren Eloquenz“, schreibt Urs Bühler. Er plädiert dafür, selbstbewusster aufzutreten und besonders beim Wortschatz schweizerdeutsche Eigenarten zu pflegen.

Danke, liebe Eidgenossen! Hiermit bitte ich alle meine bundesdeutschen Gesprächspartner um Verständnis, dass ich ab jetzt die hier übliche Ausdrucksweise verwende und bei meiner Muttersprache bleibe. Ein österreichischer, unzeitgemäßer Chauvinismus liegt mir fern; viel mehr bedeutet der Reichtum regional unterschiedlicher Sprachgepflogenheiten - befreit vom verarmenden Einheitsbrei der Massenmedien - ein wichtiges Kulturgut für mich. Dafür wird mich auch Euer ständiges „tschüss“ nicht mehr stören und ich freue mich schon auf meine nächsten Urlaube in Deutschland, um die Ausdrucksstärke norddeutscher Dialekte zu erleben.

Doch was hat das Ganze mit Esperanto zu tun? Das von Esperantisten oft gehörte Argument, dass die Internationale Sprache eine Kommunikation auf gleicher Augenhöhe ermögliche, wird bestätigt, wenn man erkennt, dass selbst unter Benutzern verschiedener Varietäten ein und derselben Sprache oft ein unangemessener Vorteil des Gesprächspartners wahrgenommen wird. Umso mehr muss dieses Argument für die Sprecher verschiedener Muttersprachen gelten. Unseren Mitmenschen die Vorteile von Esperanto sachlich - am besten durch persönliche Erlebnisse - zu schildern, darf uns niemals ermüden. **Uwe Stecher**

Zamenhof-Festo 2017



Aŭstria Esperanto- Federacio informas, ke la ĉi-jara tradicia Zamenhof-Festo okazos en la Pola Instituto en Vieno sabaton, la 2-an de decembro 2017.

Detalan programon ni publikigos en la interreto ĉe www.esperanto.at kaj cetere ĉiu membro ricevos inviton. Se vi volas kunlabori, bonvolu kontakti nin per aef@esperanto.at

Korespondpeto



Mi estas 76-jara esperantisto, emerita fervojisto, edziĝinta, kaj mi tre ŝatas korespondi kun diverslandaj gesanoj pere de klasikaj surpaperaj leteroj. Mi serĉas korespondemulon en via lando, kaj tial mi petas vin, ĉu estus eble prezenti mian korespondpeton en *Esperanto aktuell*. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn, kaj deziras korespondi pri diversaj temoj. Mi respondos al ĉiu, ankaŭ al komencanto. Elkore dankante pro via favoro mi salutas vin amike. Pavel Štastný, U Dekanky 1648/12, CZ-140 00 PRAHA 4, Ĉeĥa Respubliko.

Informstando ĉe la Evangeliaj Ekleziotagoj en Berlin

Denove „Esperanto-Liga für Christen in Deutschland“, Germana sekcio de Kristana Esperanto-Liga Internacia, havis Esperanto-informstandon ĉe Germanaj Evangeliaj Ekleziotagoj, ĉi-jare de la 24-a ĝis la 28-a de majo en Berlin.

Por tio multaj obstakloj estis venkendaj: Hedwig Fischer, kiu zorgis pri la necesaj burokrataĵoj, ne povis persone veni al Berlin, la elspezoj kreskas de jaro al jaro nun al preskaŭa nepageblo, kaj mankis moderna informmaterialo, kvankam la oficejo de Germana Esperanto-Asocio povis liveri iom.

Jam la antaŭan aŭtunon Hedwig Fischer sendis helpopeton al Berlinaj Esperantistoj. Fine estis kelkaj veteranoj, kiujn volis gvidi Alois Eder (Gärtringen), sed tiu retiriĝis lastminute pro malsano de la edzino. Lian taskon praktike transprenis Gerhard Hofmann, kiun subtenis lia filo Ullrich. Gerd Bussing kaj Peter Bäß helpis, munti la standon, kaj deĵoris ankaŭ Hartmut Mittag kaj d-ro Philipp Sonntag. Ke la vandoj de la stando estis multe pli grandaj ol atendite, estis unuflanke ĝojinde, aliflanke tiam videble mankis sufiĉe grandaj afiŝoj. Tio estos ankoraŭ problemo solvenda por estontaj standoj.



Gerd Bussing (maldekstre) kaj Gerhard Hofmann ĉe la stando. Foto: Ullrich Hofmann

Nu, ne tiom impresa stando estas tamen pli bona ol neniu, ĉar la helpintoj raportis poste, ke la intereso en la publiko estis ĝojige granda. Ĉar la aranĝo ĉiu-okaze superŝutas la vizitantojn per informmaterialo, (Esperant-lingvaj!) revuoj aŭ eĉ libroj ne taŭgas por disdoni, anstataŭe la pruvita faldfolio „Esperanto in den Kirchen“ (Esperanto en la eklezioj) kaj la konata afiŝo pri paco en multegaj lingvoj trovis grandan intereson. Gerhard Hofmann raportis, ke laŭ la nombro de disdonitaj slipoj kun la Patro-Nia okazis pli ol 150 interparoloj kun interesatoj. Tio estas rimarkinda. Junuloj elprovis per siaj saĝtelefonoj tuj la voĉhavan biblion ĉe <http://esperantobiblio.org/>, por kiu Hofmann dum du jaroj kunlaboris.

Gerd Bussing substrekis, ke estis eĉ ne unu stulta reago de preterpasanto al Esperanto, kaj Peter Bäß tre laŭdis la laboremon de Gerhard Hofmann, „sen kies engaĝiĝemo la stando ne estus funkciinta“. Hofmann mem konfesis, ke la kunlaboro por la stando tre plaĉis al li. Resume la Esperantistoj povos do esti kontentaj kun tiu agado, kaj la Berlinaj veteranoj meritas altan laŭdon. Estus kompreneble tre bonvene, se venontjare dum la Katolikaj Tagoj en Münster ankaŭ kunlaborus kelkaj aktivuloj de Germana Esperanto-Junularo.

Rudolf Fischer (laŭ raporto de Gerhard Hofmann, Peter Bäß kaj Gerd Bussing)

Preĝi en Esperanto

La 4-an de junio 2017 (t. e. la pentekosta eldono) la revuo „Kirche und Leben“ (eklezio kaj vivo) de la diocezo Münster aperigis tutpaĝan artikolon pri Esperantistaj Kristanoj sub la titolo „Beten auf Esperanto“ (preĝi en Esperanto).

Tio estis rezulto de instigo, kiun donis Rudolf Fischer al la aŭtoro, kiam tiu intervjuis lin pri la spertoj dum kunlaboro kun fuĝintoj. Stefan Lepping estis preta por tre detala intervjuo, en emocia kaj engaĝita stilo. Aldoniĝis kelkaj pli sobraj konsideroj de Rudolf Fischer pri la parenceco de Kristana kaj Esperanta idealoj.

Neeviteble aperis en la artikolo kelkaj esprimoj, kiujn la Esperantistoj malŝatas, ekzemple „Kunstsprache“ (artefarita lingvo) kaj „glühender Anhänger“ (arda ano), kaj oni povas miskompreni la informon, ke Zamenhof kompilis 16 gramatikajn regulojn kaj 900 radikojn, tiel, ke Esperanto ne havas pli. Aliflanke Rudolf Fischer atingis, ke aperis la adreso www.esperanto.de

Resume: Ne estis la unua fojo, ke aperis artikolo pri Esperanto en „Kirche und Leben“, sed dum la lastaj kvindek jaroj antaŭe neniam tiom granda.

Rudolf Fischer

Tradukantoj serĉataj por grava revuo

Post kelkara paŭzo pro financaj malfacilaĵoj, la fama revuo *Unesko-Kuriero* reaperas kadre de interkonsento inter la Ĉina registaro kaj la Organizo de UN pri Edukado, Scienco kaj Kulturo.

Ekde nun ĝi eldoniĝos kvarfoje jare en la Ĉina, Angla kaj Franca lingvoj, sed Unesko ankaŭ libere permesas alilingvajn eldonojn, se oni trovas por tio la financajn rimedojn. Nia finfina celo estas tio, ke Unesko akceptu Esperanton kiel laboran lingvon de la revuo.

Nun pretiĝas eksperimenta eldono de la Kuriero en Esperanto. Same kiel por la alilingvaj eldonoj, la teknika laboro okazos en Ĉinujo, sed pri la tradukado kaj redaktado kunlaboros homoj el diversaj landoj. Nun la ĉefa bezono estas tradukantoj, kiuj kapablas redoni la tre diverstemajn, klerajn artikolojn en bona kaj flua lingvaĵo.

Se vi deziras traduki, bv. elekti taŭgan tekston elŭtante la Angla-lingvan version ĉe <http://en.unesco.org/>

courier/2017... aŭ la Franc-lingvan ĉe <http://fr.unesco.org/courier/2017...>, kaj sciigi min pri via elekto.

Se vi ne ŝatas traduki: mankas al ni ankaŭ provlegantoj. Ĉu vi ŝatus provlegi malneton de la revuo?

Trezoro Huang Yinbao,
Pingliang, Ĉinujo, trezoro@qq.com


S-ro Trezoro Huang Yinbao postskribas jene: La Interkultura Centro Herzberg kunlabore kun nia Esperanto-Centro eldonas la revuon *Tra la mondo*. La reta versio estas senpage elŭtebla ĉe <http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de/>

Verbandsrat des Deutschen Esperanto-Bundes am 28./29. Oktober 2017 in Herzberg (Harz): Seminar zur Öffentlichkeitsarbeit

Der Verbandsrat gehört nach § 6 unserer Satzung zu den Organen des Deutschen Esperanto-Bundes. Die Sitzung des Rates, die traditionell im Herbst stattfindet, ist das wichtigste Zusammentreffen zwischen den Mitgliederversammlungen. Dem Rat gehören der Bundesvorstand und die Vertreter der Mitgliedsvereinigungen an. Die nächste Sitzung findet in der Esperanto-Stadt Herzberg (Harz) am 28. und 29. Oktober d.J. statt. Im Mittelpunkt des Treffens stehen die laufenden Angelegenheiten des Deutschen Esperanto-Bundes, der eine Phase der Konsolidierung durchmacht. Über das Vereinsleben hinaus sollten wir jedoch die Chancen nicht aus den Augen verlieren, die sich gerade jetzt für die internationale Sprache Esperanto eröffnen und auch in unserer Öffentlichkeitsarbeit Berücksichtigung finden müssen.

Ich habe daher unseren Beauftragten für Öffentlichkeitsarbeit Louis von Wunsch-Rolshoven gebeten, im Rahmen der diesjährigen Verbandsratssitzung in Herzberg am Samstag, dem 28. Oktober für ein Seminar zum Thema zeitgemäßer Öffentlichkeitsarbeit zur Verfügung zu stehen. Über den satzungsgemäßen Teilnehmerkreis des Verbandsrats hinaus sind hierzu alle interessierten Mitglieder des D.E.B. herzlich eingeladen. Details zu Programm und Veranstaltungsort werden rechtzeitig bekanntgegeben. Für Fragen und Anmeldungen steht unsere Berliner Geschäftsstelle zur Verfügung.

Ulrich Brandenburg
Bundesvorsitzender des D.E.B.



Fundstücke!

130 Jahre Esperanto, und ich habe 125 Jahre davon nicht mitbekommen!

Aber die letzten fünf Jahre hat mich Esperanto fast täglich begleitet und beschäftigt. Warum? Ich sondiere und scanne die Schriftstücke (soweit vorhanden) der aktiven Mitglieder des Deutschen Esperanto-Bundes. Die Unterlagen gehen dann an das Bundesarchiv in Koblenz, das für unser Schriftgut privater Herkunft zuständig ist. Die ersten 65 Aktenordner sind bereits erfasst, abgeholt und via Bundesarchiv Berlin nach Koblenz verbracht worden.

Ich habe also das Glück Berge von Esperanto-Material in die Hände zu bekommen. Da ist viel Trockenes dabei: endlose Abrechnungen der Mitglieder und mehr oder weniger freundliche wechselseitige Informationen rund um Aktionen oder Ärgernisse die jeweilige Zeit betreffend. Man kann diese Akten wieder anfordern, aber dazu muss man wissen was sie beinhalten.

Außerdem landet auch der ein oder andere Nachlass in Berlin. Viele der Zeitschriften wurden bereits nach Herzberg gebracht, anderes wird in Aalen oder in gebietsbezogenen staatlichen Archiven wie Berlin oder München landen - denn Bücher und Zeitschriften gehören nicht ins Schriftgut-Archiv. Allerdings gibt es vieles schon doppelt und dreifach. Da schien es am sinnvollsten, so viel wie möglich unter die Leute zu bringen und am besten natürlich damit neue Esperanto Interessierte zu erreichen. Das ist die Chance eines in einem lebendigen Viertel der Großstadt Berlin gelegenen Ladengeschäfts mit variabler Dauerwerbefläche – im Schaufenster!

Natürlich stürzte ich mich, bei meiner Sortiertätigkeit als erstes auf die Literatur des Erfinders.

Für einen Neuling ist es oft mühsam, bei seinen holprigen Übersetzungsversuchen, die Seele eines Textes heraus zu arbeiten. Da ist es hilfreich, auf gute Übersetzungen und Werke in deutscher Sprache rund um Esperanto zu stoßen.

Ein Beispiel: eine Broschüre, in der aus dem polnischen



„Esperancja – Kultura i kulturotwórcze mechanizmy“ (von Wojciech Usakiewicz, Warschau 1989) Ausschnitte übersetzt wurden. Der Übersetzer Gary Mickle hat für die Reihe: Esperanto und das internationale Sprachproblem die Seiten 71-101 als ein Beispiel für „Esperantistische Weltbilder“ aufgenommen. Usakiewicz wiederum zitiert Sätze aus dem „Originala Verkaro“ von L. L. Zamenhof, von 1929, (Leipzig 1929, S 344-345)! In denen schreibt Zamenhof, dass er aus Überzeugung Homaranist (wörtlich etwa: "Lehre der Angehörigen der Menschheit") sei und sich weder mit den Zielen noch den Idealen eines bestimmten Volkes oder einer bestimmten Religion verbinden könnte.

„Ich bin überzeugt, das jeder Nationalismus ein einziges großes Unglück für die Menschen ausmacht, und das die Schaffung einer harmonisch zusammenlebenden Menschheit das Ziel aller Menschen sein sollte. Zwar ist der Nationalismus unterdrückter Völker als natürliche Verteidigungsreaktion um vieles leichter verzeihlich als der Nationalismus unterdrückender Völker, aber so schändlich der Nationalismus der Starken ist, so unvernünftig ist der Nationalismus der Schwachen. Sie bringen einander hervor und stützen sich gegenseitig, womit sie einen Teufelskreis des Unglücks schaffen, aus dem die Menschheit nicht heraus kommt, es sei denn, jeder von uns gibt seine gruppenbezogene Selbstverliebtheit auf und bemüht sich, auf vollkommen neutralem Boden zu stehen.“ In diesem Zitat ging es um die Ablehnung einer Mitarbeit in der Jüdischen Liga zur Gründung eines jüdischen Staates – aber für mich spiegelt es ganz grundsätzlich sein Weltbild. Alle Kulturen haben gesellschaftliche, politische und religiöse Rituale. Jedoch sollten die nach geistiger Einheit streben, um Streit auszuräumen und die Herzen und Gedanken der Einzelnen wieder zu vereinen. Sich sprachlich, soweit irgend möglich, auf neutralen Boden zu stellen ist eine wundervolle Idee. Zamenhof hat mit der genialen Schöpfung des Esperanto einer Brückensprache kreierte um diese Utopie ein Stück weit zu verwirklichen.

Eine Gemeinschaft sollte nie vergessen, woher sie gekommen ist; denn sonst kann sie auch nicht wissen, wohin sie geht.

Sibylle Bauer

Protokoll der Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes e.V am Sonntag , 04.06.2017 in Freiburg

Beginn der Versammlung

9.15 Uhr

Anwesende Stimmberechtigte

87 mit zwischenzeitlichen Ab- und Zugängen

Vom Vorstand anwesend:

Andreas Emmerich, Dr. Matthias Hecking (kommissarisch), Wolfgang Bohr, Kristof Krick, Julia Noë und Oliver Walz

Begrüßung und Eröffnung

Als stellvertretender Vorsitzender eröffnete Andreas Emmerich die Versammlung. Die Versammlungssprache sei grundsätzlich Deutsch. Auf Esperanto gestellte Fragen werde er jedoch auch auf Esperanto beantworten.

Er verwies eingangs darauf, dass der Vorsitzende Sebastian Kirf durch eine ernste Erkrankung gehindert sei an der Versammlung teilzunehmen.

Feststellung der Beschlussfähigkeit

Die Einladung für die Versammlung erfolgte rechtzeitig in der Ausgabe 2017/1 der Verbandszeitschrift „Esperanto aktuell“. Die Beschlussfähigkeit wurde festgestellt.

Genehmigung der Tagesordnung

Die Tagesordnung wurde mit 1 Enthaltung einstimmig angenommen.

Wahl des Protokollanten

Zur Aufnahme des Protokolls hatte sich Guido Brandenburg bereit erklärt. Er wurde mit 1 Enthaltung einstimmig damit beauftragt.

Genehmigung des Protokolls der Bundesversammlung 2016

Das Protokoll der Bundesversammlung 2016, veröffentlicht in der Ausgabe 2016/3 der Verbandszeitschrift „Esperanto aktuell“ wurde mit 4 Enthaltungen angenommen.

Ehrung der Verstorbenen

Seit der letzten Bundesversammlung sind mit Prof. Dr. Reinhard Selten aus Königswinter, Elfriede Kruse aus Nürnberg, Hermann Heiß aus Oberkirch, Irmtraud Bengsch aus Konstanz, Dr. Gerold Lingnau aus Eppstein, Hermann-Josef Horrix aus Hürth, Herhard Hein aus Hamburg, Walter Landmann aus Heidelberg, Franz-Georg Rössler aus Dudenhofen, Dr. Detlef Blanke aus Berlin, Kurt Langer aus Dresden, Evelin Geist aus Forchheim, Gerhard Klingenhöfer aus Erlangen, Prof. Dr. Horst-Hans Renemann aus Neu-Isenburg, Wiebke Kruse aus Schwerin, Petra Richter aus Görlitz und Ursula Ahlsdorf aus Neubrandenburg 17 Mitglieder des DEB gestorben.

Die Versammlung ehrte sie mit einer Schweigeminute.

Bericht des Vorstands

Andreas Emmerich fasste die Entwicklungen im Vorstand seit der letzten Bundesversammlung zusammen. Der Schatzmeister Christoph Hoppe habe wegen einer schweren Erkrankung seine Tätigkeit ruhen lassen müssen. Dr. Ulrich Ender habe die Aufgabe übernommen, Buchführung und Belege für die Jahre 2015 und 2016 zu ordnen und dem kommissarisch zum 01.01.2017 als Schatzmeister eingesetzten Dr. Matthias Hecking zu übergeben, der sich bereit erklärt habe, dieses Amt auch langfristig zu übernehmen.

Sebastian Kirf habe erklärt, gegen seine ursprüngliche Absicht nicht erneut für das Amt des Vorsitzenden kandidieren zu wollen.

